5 Marto 1906. DUA JARO N° 5 (23)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO
De la Grupo Esperantista de Alĝero
KAJ DE LA NORDAFRIKO

Oficiala Parto

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

LES THÉS ESPÉRANTISTES

Ainsi que nous l'avions annoncé dans notre précédent numéro, une réunion d'espérantistes a eu lieu, le 22 février dernier, à l'Hôtel Excelsior. Réunion amicale s'il en fut, pendant laquelle la plus grande cordialité ne cessa de régner. De 5 heures jusqu'à 7 heures, on a parlé esperanto — un peu français aussi — et espérantisme. Le thé était servi par nos gracieuses espérantistes, qui ont fait les honneurs « de la maison » avec leur coutumière amabilité. M. Moinard, un de nos plus fervents « samideanoj », nous a déclamé un amusant monologue, intitulé : « La Benkoj de la Promenejo ». Il a obtenu un vif succès et a été félicité par M. Aubert, notre Président, pour sa bonne prononciation et surtout pour la bonne mémoire dont il a fait preuve en déclamant, sans une hésitation, ce monologue qui est assez long et assez difficile à retenir.

Au cours de cette réunion, nous avons appris avec plaisir que les démarches faites dans le but d'avoir un local avaient abouti et, à partir du 1-er mars, les cours et conférences auront lieu dans notre salle, située rue du Marché, au-dessus de l'Ecole des Beaux-Arts, au deuxième étage. Nous ne pouvons que féliciter les membres du Comité, délégués à cet effet, d'avoir réussi à doter le Groupe Espérantiste d'Alger et de l'Afrique du Nord d'un local où sera installée notre bibliothèque et où les membres du Groupe pourront consulter les documents, brochures et publications espérantistes.

Nous avons regretté l'absence, à notre premier thé, de notre « samideano » anglais, Mr F. Moscheles, Président du Groupe

Espérantiste de Londres, actuellement à Alger. Mr Moscheles faisait, le même jour, à la même heure, une conférence sur le Pacifisme ; mais il espère être des nôtres à la prochaine réunion, qui aura lieu probablement le deuxième jeudi de mars.

Sept heures sonnent. Tout le monde est étonné de voir que le temps était passé si vite : mais chacun se retire, se donnant rendez vous pour le prochain thé, enchanté de s'être si agréablement, pendant deux heures, trouvé en famille espérantiste.

STELETO.

DISTINCTION HONORIFIQUE

M. Aubert, Secrétaire général du Syndicat Commercial, notre Président, vient de recevoir les palmes académiques.

Nous sommes heureux de féliciter ici, très sincèrement, le nouveau palmé, qui a su s'attirer toutes les sympathies et, de ce fait, ne compte à Alger que des amis.

CONCOURS D'ESPERANTO

Les lauréats du premier concours de l' « Esperanta Laboristaro » sont : M. Trousselier, 24, rue Lalahoum, et M. Masia, 13, rue de Constantine, Alger. -- Ili deziras korespondi.

NOUVEAU COURS D'ESPERANTO

Le jeudi 15 mars, à 5 heures du soir, aura lieu, dans le nouveau local du Groupe Espérantiste, 4, rue du Marché (immeublé de la Salle des Beaux-Arts), au deuxième étage, un cours d'Esperanto spécial pour dames et jeunes filles, sous la direction de Mme Neyrand, professeur de langues vivantes.

Neoficiala Parto

Malsupre ni enpresas rakonteton inspiratan de la lastaj farigoj en Rusujo. Ĝin verkis knabo muĵika (kamparana) dektrijara, gimnaziano, kies nomon ni ne volas konigi, timante ke tio estos al li malutila. Tiu verketo montros la sentojn de la ereto klera de tiu kamparana klaso kiu estas la naŭ-dekona parto de la Rusa popolo kaj nepre havos, frue malfrue, gravan rolon en la aferoj ne nur de Rusujo, sed ankoraŭ de Eŭropo. Ni donas tre precizan tradukon de tiu rakonto, eĉ ne plibonigante kelkajn frazetojn, por ke niaj legantoj povu, dank' al la speciala fleksebleco kaj alfarebleco de Esperanto, ricevi ĝustegan impreson pri la stilo tute rimarkebla de nia simpatiega kunlaborantoto.

SOLDATO

La tutan tagon la soldatoj rajdadis sur la koto.

Kien rajdadis ili ? Al ili neniu komprenigis tion.

La soldatoj malmulte pensadis pri tio. Almenaŭ, la soldato de la kvina skadrono Ivan'o Teleŝov'o klopodis ne pensi pri tio. Ĉu ĝi ne estis egale ?

La multpeza, netolerebla, trijara soldata-servado, kvazaŭ senforma deliro premas lian junan animon. De tiu tempo kiam li ekestis soldato, li ĉesis kompreni sin mem.

En sia naskiĝa vilaĝo, kiam li, senparenca orfeto, gardis la porkojn, li ankaŭ ne komprenis sin mem, kaj la tuta mondo ŝajnis al li fremda kaj malbona. Sed, poste, li komprenis ĉion kaj ekamis la vivon, ĉar tiu vivo ekaperis al li per la persono de lia bontartanto-maljunulo : lia patro, lia amata patreto !

Li trovis lin, malfeliĉan orfeton, kaj iĝis kvazaŭ lia efektiva patro. Ambaŭ ili loĝis en malgranda dometo, sur la rando de ilia vilaĝeto. La maljunulo zorgis pri Ivan'o ; poste Ivan'o zorgis pri li. Bone estis tie, en la vilaĝo. Ivan'o amis la teron, amis labori, kaj li bone memoris kiom ameme li rigardis la kreskaĵojn de ilia naskiĝa kamparo, plugita de li, kvazaŭ tiuj-ĉi kreskaĵoj estis liaj parencaj-infanoj.

Kaj la ĉarma, familia dometo, kaŝinta sin meze de kelkaj betuloj, kiuj plantis Ivan'o mema. Kiel bone ili ripozis sub tiuj betuloj, post tuta tago de senfina laborego, li, kaj lia patro, kuŝantaj ilian lacan dorson !

Maljuna patro ! Patreto ! (1) Ili amegis unu la alian.

Kara malsana (2) patreto ! Kiel toleras li nun la disigon ĕl sia sola filo, sola defendantulo ?

Sola filo !... Kiel oni povis preni lin soldaton ? Ja, lau la leĝo, tio ne povas esti. Oni diris ke li estas ne parenca, sed alprenita filo ! Ĉu tio ne estas egale ? La timema Ivano ne komprenis tion. Vane lia patro kelkfoje piediradis en la urbon, vane li teren genufleksis kaj kisis la botojn de la militista estro : nenio estis .. La estro diris ke la leĝo ne konas la alprenitajn filojn...

Kio ? pensadas Ivan'o. Ne parenca patro .. Kiel povas esti ne parenca patro ? Lia maljunulo prenis lin kvazaŭ sian parencan filon kaj amegis lin... Jes, gepatroj ofte batas iliajn parencajn gefilojn — Ivano vidis tion kelkfoje — sed lia patro neniam tuŝis lin eĉ per fingro. Li nur karesis lin, kisis, kaj ripetadis : « Orfeto mia... Fileto... »

Kiel do li ne estas lia patro ?

Ĉu estas vero en la mondo ?

Ne ! La vero ne estas !

Kaj kiel la maljuna, preskaŭ ne kapabla labori patro, povas nutri sin sen sia sola filo ?

La bonega kaj kvietega Ivan'o sentis sin malbone.

... En la unua tago de lia soldata ofico, oficiro instruanta lin rajdi, batis lin kaj per sia pugno elrompis al li du dentojn. Ivan'o ekploris. La oficiro ankoraŭ dufoje batis lian vizaĝon, dirante :

— Soldato ne povas plori !

Jes, li ne devas plori ! Ivan'o ne ploris plu. Kvazaŭ peco da glacio ekkuŝis sur lian koron.

... Kiel povas vivadi lia patro ? Kie li estas nun. Ivan'o provis dufoje skribi al li letere, sed ne ricevis respondon.

Kredeble, la maljunulo eliris el sia vilaĝo kaj laboras ie ajn.

Liaj malsataj samvilaĝanoj ne povis helpi lin. Certe... Li laboras ie, en fremdaj lokoj, por satigi sin. Kiel ?

Ivan'o mem estas forpelita je centoj da verstoj el sia vilaĝo. Kaj nun li rajdas kun sia skadrono. La kamaradoj-soldatoj diras ke ili iras por kvietigi ekribelintajn muĵikojn de ia vilaĝo Ivan'o dezirus ne pensi pri tio, sed malagrablaj pensoj, kontraŭ lia volo, enrampas en lian kapon kaj brulas lian cerbon.

(Daŭrigota)

---


(1) Amika nomo donata de la muĵikoj al iliaj infanoj.

(2) Tiu vorteto, en la muĵika dialekto, estas amika esprimeto, tute same kiel en la franca lingvo la vorteto « pauvre » : Mon « pauvre » chéri !

Notre Page Algérienne



LE MARABOUT DE SIDI-YAYA, A BIRMANDREIS



ROCHERS DE LA POINTE-PESCADE

Clichés de la *Revue Nord-Africaine*.

LA MORTO DE MARTINO, LA PAŜISTO

Speciale esperantigita por *Alyeria Stelo*.

Anekdoto de la ribelo de 1898, en Milano

SEKVO

La vizaĝo de Tomaso montris doloran tordiĝon, liaj lipoj plilongiĝis kaj ironie kuntiriĝis, kaj elfaris nedefinitan bruon per lango puŝata kontraŭ la dentoj.

La filozofo Tomaso memoris ke same lia patro Martino iam vidis sian vizaĝon, dum malproksimaj tagoj de neado kaj de sarkasmemaj duboj.

Mario, inter gardistoj, malaperis je la angulo de l' strato. Bando da sentaŭguloj sekvis lin. Rapide Tomaso stariĝis. Lia tuta korpo perforte ektremis. Li iris tra la ĉambro, tute posedanta per naskiĝo de nepreciza ideo, turmentata per malkvieteco, kiu akompanas ian metamorfozon kuŝatan en la spirito. Laca, li ripozis je l' piedo de la lito, rigardante sian patron, kiu tie kuŝis nekonscia pri ĉio, kio estis okazinta, tute aliformigita per dolĉa entuziasmo.

La vizaĝo de la mortanto montris diafanan palecon; lasta blovo de vivo elspiriĝis de la sitentaj lipoj. La pupiloj ne vidis plu la limojn kaj la formojn de la objektoj, sed brilis per hela songo, post kiu finis ĉiuj ĉagrenoj kaj nur li ekvidis vastegan kaj brilegan aperon

La morto proksimiĝis, kiel apoteozo.

Tomaso silentis, li atendis pensante pri funebraj kaj doloraj aperoj, kiujn li ne povis malproksimigi, ĉar li vidis ilin per pupiloj sen palpebro, kiujn nenia volo povas fermi — laŭ esprimo de Gabriel d'Annunzio, — per la pupiloj de l' animo.

Li havis mortan senmovecon, ŝajnis ke lia estaĵo nenion sentis plu pri la vivo. Li staris simile je ajo renversita kaj teren defetita, simile je morta objekto.

Subite, nova spirito de vivo ŝajnis ĉe li revivi, kvazaŭ vekiĝo malfermis liajn okulojn por naskiĝonta horizonto, kaj li pensis ke l' vualo, kiu tegis siajn okulojn estu falinta, ke pretermonda estaĵo estu malkovrinta senmortajn sekretojn; tiam, simile je la blindulino de l' tragedio, li vidis tion, kion li reale ne vidis: li vidis sin mem proksimiĝantan al mortanto, kisantan lian palan frunton, kaj genue falantan antaŭ sia patro, mallevantan siajn manojn, poste, humile eklevantan al krucifikson, kiun tenis la paŝisto inter la manoj, siajn

radilumajn okulojn iluminatajn per interna flamo, kaj al li ŝajnis ke, ĉe sia korpo, estis enirinta superhoma espero, ke tuj sia kontenta spirito retrovas la forgesitan vorton :

« Pardonon ! »

Ŝajnis ke Martino sekrete observas la filon, ke liaj okuloj vidas en lumo de senlima apero ; dolĉega rideto sur la lipoj de l' mortanto aperis, kaj nun la pupiloj ĵetis plej vivan brilon.

Tiam, iom post iom, je la dolĉa suno de majo, liaj pupiloj malfermiĝis, finis la spiro, kaj rigide la membroj streĉiĝis. Sed neŝanĝebla rideto restis sur la lipoj.

Tomaso humiligata antaŭ la kruco, kun la okuloj suprenlevataj, adoris Kriston, kiun tenis la longaj kaj palaj manoj de l' mortinto.

Tra la pordo de l' balkono, murmuro de mallaŭtaj voĉoj eniris. La suno de majo, tra la vitraĵoj, iluminis la grizan kapon de l' filozofo, kiu preĝis.

— FINO —

Don Bernardino RICCI.

Esperantigis Graffo Albert GALLOIS.

Dekkviŋaŭgusta Ordeŋito

Daŭrigo

« Nu, nu, mia bravulo, via vico okazos la rroksiman jaron. » Kaj li altreĉis sian manon per bonanima ŝajno.

Kvazaŭ ne vidante ĝin, l' aga'o senresponde kliniĝis denove kaj foriris. Li sciis kion valoras la promesoj ne l' marŝalo kaj vidis sin de nun malhonorigitan de oficeja intrigo.

La sciigon pri la malfavoro jam oni disvastigis tra la tutan urbon. La Hebreoj de la strato Bab-Azun malafable ridis kiam li trapasis. La arabaj vendistoj, male, pro kompato deturnis sin, kaj tiu kompato doloris lin pli multe ol tiuj ridoj. Rapide li marŝadis apud la muroj, kaj intence serĉadis la strateloj la plej malhelajn. La loko de sia kruco forigita bruligis lin kiel malfermita vundo. Kaj, senĉese li pensis : « Kion tuj diros miaj rajdistoj ? Kion diros miaj virinoj ? »

Tiam en si mem li sentis elpuŝojn pro furiozeco ; li vidis sin predikantan pri la sankta milito ĉe la landlimoj de Marok'o ĉiam rugaj pro bruladoj, aŭ kurantan la stratojn de Alĝero kune kun siaj gumanoj, rabadantan la Hebreojn, mortigantan la kristanojn kaj, fine, falantan mem meze de tiu granda malordigo en kiu li estus kaŝinta sian honton. Ĉio al li ŝajnis ebla pli bone ol reiri lian genton... Subite meze de tiuj venĝemaj projektoj, penso pri la Imperiestro sprucis en en lia cerbo kiel lumo.

« L'Ambrur !... » Ĉe Si-Sliman, kiel ĉe ĉiuj Araboj, la ideo pri justeco kaj potenco estis enigita en tiu sola vorto : « L'Ambrur ! »

Li estis la vera estro de l' kredantoj de tiuj degenerigitaj mahometenoj ; la alia, tiu el Stambul ŝajnis el malproksime kiel ia estaĵo de sagĝo, la nevidebla papo, kiu gardis nur spiritan potencon kaj, dum la nuna tempo, oni scias kiom tiu povo valoras. Sed l'Ambrur kun liaj grandaj pafilegoj, liaj zuavoj, lia fera ŝiparo... Tuj kiam li pensis pri li Si-Sliman esperis ke li estus savota. Nedube la Imperiestro tuj redonos lian krucon, tio postulas oklagan vojaĝon. Kaj tion, tiel forte li kredis, ke li ordonis al sia gumo ke ĝi atendos lin ĉe la Alĝeraj pordoj. La morgaŭon, la vaporŝipo lin elveturis Francujon tute pia kaj kvieta kiel por pilgrimo al Meko.

(Daŭrigota)

A. DAUDET.

Esperantigis A. BAISSAC.

Sinjoro BARTHÉLEMY BALS, 12, strato de Nuits, Alĝero (Alĝerujo), deziras korespondadi kun fremdlandaj geesperantistoj pri teatraj aferoj.

Ĉiam kaj tuj respondos.

☞ **L'Imprimerie TORRENT, 57, rue d'Isly, Alger,** livre aux Espérantistes de superbes cartes de visite, portant, sur le coin gauche (impression verte), le mot « Esperanto » au-dessus de l'étoile espérantiste. Le prix est de 3 francs le 100 (0,25 en sus pour envoi postal). Le numéro d'ordre, imprimé en noir, peut être ajouté au-dessous de l'étoile.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly

Lettres accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris